Malfermita letero al ILEI por respondi al neklarigitaj punktoj

kaj al la tuta "Civitana Homaro Esperante". ***La 17.a de Januaro 2015***

Saluton al vi,

- Pri la vorto "mocio " kiun mi uzis laù mia vidpropono venonta, mi certas ke esperantistoj povas facile trovi en la retejo vortaron kiu tradukos ghin specife. Ofte mi preferas verigi kion mi uzas kaj tiu "MOCIO" mi trovis en la vortaro de Waringhien... mi bedaùras !

- Kompreneble ni ne povas imponi ian ajn modelilon al UNO aù UNESKO, kie ankaù shtataj rivalecoj trakuras, tion mi tro scias char de longe mi okupighas pri tiela problemo, historie aparte. Sed mi pli mal pli bone implicitis ke la celo de mia propono estis klarigi specon da komuna vizio tra esperantistaj interkonsentoj, (debatlisto) ech se ankoraù ne sufichas la intershangho de ideoj. La trafenda punkto kushas en la ekspono al mondpublika civitaro, de necesa planlingvo kiel instrumento de strategio je lingvplano...

- Legante reagojn diversajn kaj tekstojn de iuj, mi aktuale evoluighas de la "nenocia nocio de MOCIO", kiu povus iom enlumigi la strechon de la planeda perfortado, al tiu de "CHARTO". Chiam en la sama spirito, apud-per-kune la "kolokva dinamiko" se eblas akordighi. Mi pensas ke ni povu disvastigi la esperon partigi baldaù la eblon interkomunikadi terskale. Tion estis ja kaj jam elmontrita de longe kaj ne trovighas ghis nun pli bona solvo, chu ne ? Ech se ni devas konsenti ke la angla, apud aliaj lingvoj, faras amenaù parton de tia laboro, konsiderante la malcheesto de justeca solvo.

- Mi tute komprenas la preterlason, hezitemon aù detenon de iuj, sed ne konsentas al minaco de eblan mokindo kies modo estas de longe la método por apudigi la esperanton che la diversaj institucioj, chu ne ? Belege ke ni povu esti ricevitaj en oficialaj kortegoj se ni neniam akcelos al digna agnosko. Chu la popolo havas vorton por diri ? Tion mi provas aldoni al la panoplio. Mi vidas la chiaman timon che la ordinara esperantisto kiel che la ajna persono, kaj konscias pri ghia senco. Sed nia rolo estas iom malsama, tiupunkte mi preferus resti iom de malproksime se devus esti necese, char tiun obstaklon mi jam renkontis kiam mi pripensis la kreadon de EDE. Batalante kunfide tiutempe, la entrepreno fine sukcesis !

- Pri la teknika mencio de la du urboj Neuchâtel kaj la Chaud-de-Fond, mi jam alghustigis la ajhon, kompreneble. Ne necesas tro gravigi tion, chiu kapablas viziti ILEI-tttejon por trovi la trafan informon. Sed ne plu estas tempo por disigi nian forton nek disperdi energion nian tra nefinitaj pruvoj de la valoro kaj praktikeco ed esparanto, kies intereso neniam atingis sincere tiuj kiuj devus respondeci de ghi, kaj se tio estis, ni vidis la oponon de iuj bloki la eliron ! Chu ni ne priscias tion ? Mi do ne tamen deklaras ian ajn malamikecon al ili sed nur konsentighas pri konscia krizstato. Kial nun tio devas esti popularigi internacie tra kelkaj chefaj PRINCIPOJN kiuj komponas ia…

…CHARTO de TUTTERA PLANLINGVO

Seppunkta Anonco :

- **- Nepras neceso de komuna HELPLINVO, neùtrala kaj intelekte demokratia…**
- **- Simbole elektindas senprokraste uzadon de ESPERANTO je universala skalo…**
- **- Tiucelen, ni akordighu je "LERNOPCIA RAJTO", laù eblaj peroj, en chiuj landoj…**
- **- Sekve, disvastighu internacia KAMPANJO pere de nelimigita amasmedia ilaro…**
- **- Postulas publike, politika SUBTENO de chiu ajn civitforto preta jesi decideme…**
- **- Kvankam fatala oponado, REZOLUCIO tia starigos fundende danke al nia memfido…**
- **- Gravas havi markilon kies nomo "EKO-2015" estas sago atingonta sian celringon…**

Bone komprenu min, mi serchas antaùenigi, ne ridindigi la uzadon necesan de planeda helplingvo, kaj vidas ke fakte tiu kiu defendas tiun koncepton ne estas ofte preta je agado konktreta. La propono de simpla lernado “elektebleca-nedeviga-opcia” (*opcio che Waringhien, uzita por la financo havas la saman sencon*) en instruado, estas sufiche klara por ordinara civitano kiu ech ne priscias la ekzisto de tia lingvo, fakte, mi tute ne ignoras tion ! La principo kaj la temo devos poste esti tradukitaj al naciaj lingvoj, estas geopolitika afero.

Fine mi shatus substreki ke laù mi, la unua bremso al la ekkuro de esperanto loghis kiam la asembleo en Boulogne-sur-mer en 1905, rifuzis la principon de HOMARANISMO, kiu necesis akordi spiritecon kun scienco. Denove la demando estas antaù ni sed tiutempe, ni ne povos eskapi.

Kzemple, iu amiko sendis al mi informon pri la laboro de Paiva Netto kaj de sia Legio de Bona Volo en Brazilio, kies vivo honoris UEA pri lia tute neordinara agado. Ne interesas ni en la fundo, ne pro iu ajn religio fakte ech se tamen tio ankaù gravas, estas unue kaj chefe pri vereca sinteno, kaj science kaj spirite, en la senco de "eco", por ordigebli la vivon mem. Kaj pro ghia forigo de la shajniga ekonomia socio, nimem estas forigitaj de ghi ! Tion ni dolore nun spertas planeskale. Kiel civitanoj ni estas devigaj aùdigi la vochon de la surtera plejmulto kaj de nia proksimulo samkiel.

Do ni konkludu la tutan !

Mi estis chiam atentema je la evoluado de la movado, kaj kiam mi estis scianta pri la kolokvo, mia entuziasmo vekighis senhezite, vidante eblan shancon por unuigi denove kion shajnas al mi tiom evidenta, sciate : **lernada ebleco por chiuj** … de esperanto kompreneble ! Principon kiun Azio kaj "BRICSoj*" devus chefe subteni senprokraste kaj senbremse. Mi malfortune konstatis la dormemon de plejmuto inter ni, kiun ajn landon ni priparolas ! Kaj aparte, la diversaj agadoj staras nek sufiche sagacaj nek plenkoraj de unueco ! Havu ni novan lumon en ghi.. (** : B-Brazilio, R-Rusio, I-Hindio.Barato, C-Chinio, S-Sud.Afriko)*

Mi konscias ke la celo de tia kolokvo povas esti pli malpli tre aparta en sia naturo mem, vidante la klasikan prezentadon de ghia diplomatika medio. Sed nenio malpermesas al tiuj kiuj volas okaze de tia evento evidentigi la senecojn de la oficiala lingva politiko chu ONUa, UNESKOa, chu nacia, chu internacia... Sed chiam neeviteble tra kaj la edukada sistemo en kiu mi laboras pasie de multaj jaroj en Francio. Ni do provu elmontri la neceson popularigi legitiman peton pri demokratia rajto rilative al la mondigita civitaneco enpashen. Mi esperas ke mia "retoriko" estus komprenebla kaj komprenota ech se mi ankaù tute konscias pri la malforto de mia skribkapablo esperante. Estas same por chiuj… kaj do justa kaj trafa por diplomatio !

Logikas ke tiu malferma letero estu publikigita kiel argumentaro pri la EKO-2015 projekto, scianta ke la debata ringo en kiu malmulto partoprenas ghis nun, estas limigita. Tamen mi gratulas chiun kiu kuraghas doni almenaù opinion pri la defio tia en la nomo de ghi. Mi esperas ke ni trovos konsent-terenon en kiu kune, chu institucioj esperantistaj aù ne, chu civitanoj favoraj al esperanto aù ne, kapablos interdebati tiun lingvpolitikan koncepton, kaj evoluigi chiam pli utile tian justecan lingvon, cele al civitana komunikado, ne nur internacia sed vere kaj esence universala, surbaze de respekto kaj de personoj kaj de lingvkulturoj.

Kun frateca sento kaj espereme - Kristien Garino